

Muusses Esperanto Biblioteko
Redakcio: J. Glück, T. Jung kaj J. H. J. Willems

N. 1

La grandaj filozofoj kaj la universala lingvo verkis Julius Glück

Esperanto-Eldonejo
J. Muusses-Purmerend (Nederlando)
Copyright 1937

(p. 3) PRI LA AŬTORO.

Julius Glück naskiĝis 12. III. 1877 en Daleké Dušniky (Ĉeĥoslovakujo). Li studis natursciencojn, inĝenieran fakon kaj filozofion en Praha kaj Vieno. Post la mondmilito, kiun li partoprenis kiel oficiro ĉe la aŭstria armeo, li fariĝis komerca direktoro en Berlino.

En 1907 li esperantiĝis kaj de tiu tempo partoprenis la Esperanto-movadon kiel propagandisto, organizatoro, kursgvidanto, verkisto kaj ĵurnalisito en Centra kaj Okcidenta Eŭropo. La nombro de liaj ĝisnunaj kursoj, inter kiuj diversaj radiokursoj, estas ± 250.

Glück propagande kontaktiĝis kun multaj famaj personoj kaj tiel gajnis plurajn influricajn eminentulojn por Esperanto. Kiel estrarano ili apartenis al diversaj Esperantaj organizaĵoj (*Unua Esperanto-Unuiĝo* en Vieno; *Esperanto-Gruparo* en Berlino; *Internacia Oficejo por Esperanto-Instruantoj*); li krome estis membro de ekzamenaj komisionoj.

Aperis diversaj libroj, primondlingvaj (lernolibroj, vortaro) kaj literaturaj, verkitaj de li.

Kiel ĵurnalisito Glück kunlaboris en la grandaj tagĵurnaloj kaj fakgazetoj en Vieno kaj Berlino. Krom tio li eldonis por la germanlingva gazetaro regulan "Esperanto-Korrespondenz". Por pluraj Esperantogazetoj li verkis artikolojn, k.e. por *Lingvo Internacia*, *La Revuo*, *Esperanto* kaj *Heroldo de Esperanto*.

(p. 5) Ĉi tiu libro estas dediĉita al tiuj regantoj de la homa spirito, al filozofoj de universala formato, kiuj plensukcese kaj potence influis la evoluon de la scienco, kulturo kaj progreso, kaj kiuj ankaŭ havas specialan signifon por la Universala Lingvo.

René Descartes (latine: **Cartesius**) 1596—1650.

Mi memoras la belegan legosalonon de la franca urbo *Tours*, kie mi dum kelksemajna restado kun profunda intereso studis la verkaron de *Descartes*.

Havante antaŭ mi liajn verkojn en malnova franca lingvo –iom laciga por mi-- de tempo al tempo mi ripozis kaj elrigardis tra la fenestroj eksteren, kie antaŭ la biblioteka konstruaĵo staras lia monumento.

El Francujo mi baldaŭ venis Nederlandon, kie *Descartes* antaŭ tri jarcentoj longan tempon vivis kaj siajn ĉefverkojn skribis.

Mi ankaŭ rememoras, ke kiel juna studento mi multe okupis min pri la legado de liaj verkoj. Li apartenas al la filozofoj, kiuj min forte influis kaj kiuj estis decidaj por mia altlerneja studado pri filozofio, matematiko kaj naturscienco. Tial *Descartes* ne estis nekonato por mi, kiam alborde en la haveno de Esperantujo, mi denove lin (p. 6) renkontis. Estas do kompreneble, ke ia mistera sorĉa forto min alligas al ĉi tiu pensulo.

Biografio de Descartes.

René Descartes naskiĝis la 31-an de Marto 1596 en la franca urbo *Le Haye*, en la regiono Touraine,

nomita la ĝardeno de Francujo.

Estante 21-jara li eniris (1617) en la holandan armeon, kiu sub *Morico de Nassau* militis kontraŭ Hispanujo. Li bivakis en la urbo *Breda*. Sed baldaŭ li forlasis Nederlando, por ĉe la bavara armeo militservi kontraŭ *Bohemujo*. Ne longe li soldatis. Post sia eksiĝo li vojaĝis *Vienon* kaj *Praha' n*, kie li iom da tempo restadis. Sed baldaŭ li denove militservis. Li eniris en la imperiestran armeon, por batali kontraŭ Hungarujon. En sia libera tempo *Descartes* ĉiam okupis sin pri sciencaj kaj filozofiaj studoj kaj laboroj.

Post sia fina eksiĝo de la armeo en 1621 li travojaĝis Nederlando, por tie viziti la vidindajn lokojn. En 1622 li reveturis Francujon. Plurajn jarojn li okupis sin pri sistemaj, metodaj kaj sciencaj esploroj, precipe sur la kampo de matematiko kaj metafiziko.

La jaro 1629 estis decida por *Descartes*. Li forlasis sian maltrankvilan patrujon kaj transloĝiĝis Nederlando, elektante ĉi tiun junan ambician ŝtaton, kiu jam tiutempe famgloris pro siaj libereco, progresemo kaj akcelado de l' sciencoj kaj (p. 7) arto. Li ekloĝis en malgranda kasteleto de la urbeto *Franeker*. De tie li iris *Amsterdamon*. Dum lia dudekjara restado en Nederlando li loĝis en 19 lokoj. En la trankvila nederlanda kasteleto *Endegeest* li finlaboris en la jaro 1643 sian ĉefverkon "*Principia philosophiae*" (La principoj de la filozofio).

Sed ankaŭ al ĉi tiu spiritgvidanto ne estis, kiel al multaj aliaj, ŝparata la amareco de l' homa sorto. Kvankam li amike interrilatis kun *Morico de Nassau*, li tamen finfine estis ĉirkaŭita de konfliktoj, malpaco kaj malamo.

Sekvante la inviton de la sveda reĝino *Kristino* (la filino de Gustavo Adolfo), li forlasis Nederlando kaj iris en Oktobro 1649 al Stokholmo. La akra norda vintro atakis lian sanstaton kaj la 11-an de Februaro 1650 li mortis.

La signifo de Descartes por la Universala Lingvo.

Ĉi tiu eminenta filozofo kaj scienculo, nomita la patro de la modernaj filozofio kaj geometrio, havas eksterordinaran signifon por la mondlingvo: ja oni eĉ povas diri, ke li kiel la unua elpensis kaj fiksas la fundamentajn leĝojn de la Universala Lingvo.

Sur similaj, preskaŭ la samaj, reguloj baziĝas la genia verko de *Zamenhof*, kiu, kiel oni scias, ne konis la prilingvajn laborojn de la franca scienculo.

(p. 8) Dum sia loĝado en *Franeker* *Descartes* skribis la 20-an de Novembro 1629 al sia klera, franca amiko, la abato *Mersenne*, detalan leteron, en kiu li prirespondis la demandojn de sia korespondanto rilate al la artefarota lingvo kaj ĝia konstruebleco. Li decide konfirmas la eblecon, krei artefaritan Universalan Lingvon.

En ses partoj de ĉi tiu ampleksa, tre interesa letero, li skizas la ĝeneralan skemon por la Universala Lingvo. Interalie li skribas:

“La artefarita lingvo estas ebla kaj oni povas trovi la sciencon, de kiu ĝi dependas. Per la helpo de tiu lingvo vilaĝano juĝos pri la esenco de l' aferoj pli facile ol nuntempaj filozofoj...

Tiu lingvo havas nur *unu specon* de konjugacio, deklinacio kaj vortokonstruo.

Ĝi ne havas la formojn neplenajn aŭ neregulajn...

La ŝanĝo de la verboj kaj la vortokonstruo devus esti formataj per afiksoj, aldonataj al la komenco aŭ fino de la radikvortoj. Ĉi tiuj afiksoj troviĝus en la ĝenerala vortaro. Eĉ la simplaj kapoj, uzante ĉi tiun vortaron en la daŭro de ses monatoj, libere ekposedus la similan lingvon...

Estas multaj homoj, kiuj volonte uzus kvin ĝis ses tagojn, por ke ili povu interkompreniĝi kun ĉiuj homoj...

Mi kuraĝas esperi universalan lingvon, tre facile lerneblan, rilate al prononcado kaj skribado. Ĉefe ĝi helpus esprimi ĉion tiel klare, ke al la uzantoj ne estus eble erari.”

(p. 9) Kia parenceco, kia konkordanco de la ideoj ĉe *Descartes* kaj *Zamenhof*! Ni povas konstati, ke jam antaŭ pli ol 300 jaroj *Descartes* teorie tute ĝuste starigis la fundamentajn regulojn de la Universala Lingvo, kiujn *Zamenhof* – kiu ne konis la laborojn de *Descartes* – sammaniere aplikis en sia Fundamento.

Jam Amos Comenius (Komenský) 1592—1670.

La plej granda ĉeĥa scienculo, filozofo kaj pedagogo, estas nomata la patro de moderna pedagogio kaj ankaŭ la instruisto de la nacioj. Li naskiĝis la 28-an de Marto 1592 en Uhersky Brod. En la jaro 1604 mortis liaj gepatroj.

Dum 1613 li estis enskribita ĉe la universitato en Heidelberg. Post siaj universitataj studoj li iris al Amsterdamo kaj en la jaro 1618 li fariĝis pastro de la Ĉeĥaj Fratoj (Frata Unuiĝo).

En 1627 li estis ekzilita kaj forlasis sian arde amatan patrujon.

En 1648 oni elektis lin kiel episkopon de la Frata Unuiĝo, kies lasta ĉefpastro li estis. Preskaŭ kvin jardekojn li energie kaj sindone laboris por la bono de l' homaro, dediĉante ankaŭ profundan amon al sia patrujo, kiun li, 35-jara, devis forlasi.

Comenius skribis pli ol 150 verkojn.

En 1640 li fariĝis rektoro de la gimnazio en Lesna (Polujo).

Tie li komencis sin okupi pri “*Panhistorio*”, (p. 10) (historio de scienca esplorado kaj serĉado de la vero) kaj krome li ankaŭ komencis labori pri “*Pandogmatio*,” t.e. la metodoj laŭ kiuj la homaro povas akiri la scion.

Comenius en Londono.

Meze en siaj laboroj (1641) *Comenius* ricevis de sia angla amiko *Hartlib* inviton veni Anglujon. Alveninte *Londonon* li estis surprizita, kiam li aŭdis, ke la angla palamento mem lin invitis, por ke li starigu kaj fondu scienculan kolecion de 12 membroj, kiuj devis labori por la progreso de la diversaj sciencoj. *Comenius* tuj komencis sian laboron, sed la tieaj politikaj malordoj kaj la ribelo de la irlandanoj malebligis la ekfunkcion de ĉi tiu kolegio.

En Londono *Comenius* tamen dediĉis sian liberan tempon al la preparo de sia verko “*Via Lucis*” (Vojo de la lumo) por la supre nomita kolegio. En tiu verko li okupas sin pri la plej efikaj rimedoj kaj vojoj, por ke la homaro liberiĝu el la mallumo kaj el la amaso de la erarigaj doktrinoj. Li rekomendas kiel la plej taŭgan helpilon la libropresadon kaj la transmarajn vojaĝojn. Li montras, ke ĉefe estas necese, disvastigi scion kaj klarecon per helpo de elementaj lernejoj en la tuta mondo.

Plie li rekomendas, ke la scienca kolegio havu la taskon, ellabori universalajn librojn kaj *ke la kolegianoj por la universalaj lerniloj elpensu kaj faru Universalan lingvon*. En ĉi tiu por la Esperantistoj (p. 11) interesa verko, *Comenius* antaŭvidas kaj eĉ profetas la tempon, en kiu la homaro ĝuos la uzadon de Universala Helpa Lingvo, ĉar, tiel argumentas li, *la mondo bezonas komunan lingvon*. La estonta mondlingvo estos nekompareble pli facila kaj tial ankaŭ pli facile akirebla ol estas ĉiuj naturaj lingvoj.

Pedagogiaj reformprojektoj.

Lia plej grava verko, konata de ĉiu pedagogo, la “*Didaktiko*”, aperis unue en la jaroj 1628—1632 kaj en la latina traduko en la jaro 1657, presita en *Amsterdamo*. En ĝi li montras la “*arton de la arta instruado*” kaj malkovras la manieron, eduki la junajn homojn al noblaj moroj kaj instrui ilin en la utilaj scioj. Li postulas por la kompleta edukado 24 jarojn, kiuj dividiĝas en kvar periodoj, nome:

1. (*schola materna*) la antaŭprepara instruo de la naskiĝo ĝis la 6a jaro;
2. (*schola vernacula publica*) la nacia popollernejo de la 6a—12a jaroj;
3. (*gymnasium*) la latina lernejo de 12a—18a jaroj;
4. (*academia*) universitato de la 18a—24a jaroj.

Aliaj verkoj de *Comenius* pritraktas la instruon kaj studon de lingvoj. Nur kelkaj estu menciataj.

Comenius kiel filologo.

En 1631 li verkis por siaj lernantoj negrandan (p. 12) lernolibron de la latina lingvo (*Janua*

linguarum reserata), kiu en malmultaj jaroj estis konata kaj uzata en tuta Eŭropo. Ĝi portis lian famon al la transmaraj landoj. En ĉi tiu libro *Comenius* ne nur klopodis forigi la malfacilaĵojn de la latina lernado, sed la libro devis ankaŭ konigi al la lernantoj la plaj gravajn okazintaĵojn en la mondevoluo. Ĝi vekis tian intereson, ke baldaŭ aperis tradukoj en diversaj lingvoj.

Unu jardekon poste *Comenius* esploris ĉiujn samtempajn lingvajn instrumentojn, analizante la teorion de la instruado kaj starigante novan teorion de ĝusta instruado. La rezultojn de siaj esploroj li publikigis en *Linguarum methodus novissima* (Plej nova lingva metodo, publ. en 1642 kaj 1649).

Al la sama kategorio de liaj verkoj apartenas lia fama *Orbis pictus* (Mondo en bildoj), kiu per multaj bildoj klarigas la koncizan lernolibron, *Janua linguarum*.

Ni plie menciuj nur la libron “La Metodo de lingvoj”, verkitan por la svedoj.

Eble iu leganto dirus, ke tiu parto malmulte aŭ tute ne rilatas al la Universala Lingvo. Mia opinio ili eraras. Ofte oni citas tiun aŭ alian eminentulon ne konante liajn laborojn, ne sciante precize lian signifon por la Universala Lingvo.

Tiu tasko instigis min en nedetala maniero preparoli kelkajn verkojn de *Comenius*, por ke oni pli klare kaj bone komprenu, kian altan valoron ĉiu lia (p. 13) favora juĝo aŭ eldiro pri la Universala Lingvo havas en tiuj pedagogiaj rondoj kaj ĉe la filologoj, kiuj ĝis nun flankenstaras rilate al la ebleco de mondhelplingvo.

Mi ankoraŭ volas montri, ke *Comenius*, tiu certe kompetenta pedagogo kaj eksterordinara eminenta filologo estis favoranto kaj akcelanto de la lingvo internacia. Eble en tio kelkiu batalanto por la ideo de mondhelplingvo trovos novajn sciencajn argumentojn, por konvinke refuti la erarajn eldirojn de iu ajn kontraŭulo.

En kiuj verkoj okupas sin Comenius pri la Universala Lingvo?

En diversaj siaj verkoj *Comenius* pritraktas la Universalan Lingvon. Ekz. *Panglottia* (Universala kulturado de lingvoj) enhavas ĉefajn lingvajn regulojn kaj ankaŭ ideojn pri la *nova perfekta lingvo* en la servo de la scienco.

En: *Panaŭgia* (Ĝenerala klerigo, 1662), *Unum necessarium* (Unu necesa, 1668) kaj *Triertium catholicum* (Universala triarto, 1672), per kiuj verkoj li multe kontribuis al la homara progreso kaj interpopola kompreniĝo, *Comenius* ankaŭ okupas sin pri nova perfekta lingvo, kies ĉefa tasko devas esti, servi al la mondkulturo, monduuiĝo kaj al la sciencoj.

Comenius en Svedujo kaj en Nederlando.

Comenius vojaĝis kaj vivis en diversaj landoj (p. 14) de Eŭropo. En Nederlando li kunvenis kun la franca filozofo *Descartes*.

Ne longe restis *Comenius* en tiu ĉi lando, sed rapidis al *Svedujo* por renkonti tie la holandan grandkomerciston *Lodewijk de Geer*, la subtenanto de subpremataj homoj. De *Geer* ebligis, ke *Comenius* estis akceptata en *Stokholmo* de la grand-kanceliero *Axel Oxenstierna*, kiu vigle interesiĝis pri la reformo de tiama sveda instruado. Dum kelkaj tagoj ili ambaŭ preparolis ĉi tiun temon, kaj la proponoj de *Comenius* tiel influis la kancelieron, ke li proponis al *Comenius* la superan inspekton de la tuta instruado en *Svedujo* kaj ankaŭ prezentis la ĉefan scienculon al la reĝino Kristino.

Por verki novajn prilingvajn librojn li forlasis *Svedujon* kaj elektis per subteno de *Oxenstierna* la trankvilan, tolereman, orientprusan urbon *Elbing* (1642).

Poste ankoraŭ *Comenius* loĝis en aliaj lokoj, ĝuante en la komenco la monhelpon de *Lodewijk de Geer*; sed baldaŭ la sorto de *Comenius* malfavoriĝis, ĉar *L. de Geer* rifuzis la pagon de la promesita subvencio. Krom tio pro la tiama terura milito *Comenius* ne nur perdis siajn multvalorajn manuskriptojn, la verkadon de multaj jaroj, sed ankaŭ sian tutan havaĵon. Samtempe la jam prespreta ĉeĥa-latina vortaro perdiĝis.

Denove vagado. Finfine *Laurens de Geer*, filo de *Lodewijk*, invitis lin veni al Amsterdamo. Ĉi tiun

inviton la malriĉa *Comenius* ĝojoplene akceptis kaj transloĝiĝis en la nederlandan ĉefurbon (p. 15) (1657). La loĝantaro lin estimplene akceptis. En ĉi tiu sia nova hejmurbo li nun povis trankvile dediĉi sin al la laboroj. Multe li verkis, senĉese ĝis sia vivfino.

Ses semajnoj antaŭ sia morto en Oktobro 1670 li finis sian jam nomitan verkon *Triertium catholicum*. En ĝi li pritraktas la interrilaton de la pensado, parolado kaj agado.

Preskaŭ okdekjara li mortis la 15an de Novembro 1670 en Amsterdamo. La 22an de Novembro li trovis sian lastan ripozejon en *Naarden*, en kies kapelo 1936 oni starigis monumenton indan je ĉi tiu famulo; en la sama urbo oni ankaŭ instalas “muzeon Comenius”.

Lia humanismo.

Se oni okupas sin pri la karaktero kaj la laboroj de *Comenius*, evidentiĝas, ke li estis profunde serioza kaj altanima, ke lia vivo, koro kaj pensoj tute apartenis al la junularo, ke li ĉiam serĉis kaj ankaŭ trovis por ĝi facile ireblajn vojojn, por akiri la plej altan gradon de scio. Sed ankaŭ por la suferanta homo batis lia nobla koro. Li tial laboris por la junaj homoj, por ke ili kiel plenaĝuloj forigu la malkonsenton kaj malpacon, por ke ili kaj iliaj posteuloj ĝuu la benon de vera surtera paco. Oni povas lin ankaŭ nomi la vera pacifisto, kiu senĉese laboris pri la problemo ne nur kunigi la unuopajn individuojn, sed ankaŭ la naciojn per la alta komuna celo de ĝenerala plibonigo kaj interpacigo.

(p. 16) La humanisma idearo kaj la percepto de vere nobla internaciismo kunigita kun sincera patriotismo montriĝas en ĉiuj liaj verkoj.

La profetaĵo de la germana filozofo *Leibniz*: “Iam venos la tago, kiam la plej bonaj homoj – vin *Comenius* – laŭdos pro ĉio kion vi faris, esperis, kaj deziris” – hodiaŭ ne plu estas profetaĵo, sed fakto.

Gottfried Wilhelm Leibniz

(1646-1716).

La mondlingva ideo jam antaŭ jarcentoj okupas la scienculojn. Por pritrakti la riĉan, malnovan fontaron, estus necese skribi apartan verkon, kies partoj etendiĝus ĝis la antikvaj tempoj. Oni trovas interesajn kaj ankaŭ multajn senvalorajn verkojn pri tiu temo.

La universala geniulo *Leibniz* estis la unua kaj eble ĝis nun la tutsola kapablulo, kiu per sia akra spirito kunigis ĉiujn ĝistiamajn ideojn pri mondlingvo. Jam kiel junulo li dediĉis sin kun granda intereso al tiu serioza esplorado de ĉiuj tiutempe konataj projektoj. El tio rezultis, ke la ekzakta esplormetodo de *Leibniz* kreis la unuan vastan sciencan bazon sur kiu la mondlingvanoj de postaj jarcentoj konstruis kelkfoje realajn sed pli ofte fantaziajn projektojn de l' mondlingvo.

Sed *Leibniz* de sia juneco ĝis sia vivofino klopodis konduki la homaron el la multlingva kaoso al (p. 17) kuniga unulingveco, al interkompreno kaj fruktodona harmonia kunlaboro.

G. W. Leibniz naskiĝis la 3an de Julio 1646 en *Leipzig*, kie lia patro estis universitata profesoro de la moralfilozofio. La juna Leibniz estis eksterordinara, naturdotita lernanto kaj ege lernema. Jam kiel studento kaj ankaŭ poste li ĉiam celis al libereco kaj firma juĝpovo. En ĉiu scienco, pri kiu li sin okupis, serĉis Leibniz ion novan. Dekkvinjara li jam vizitis la *Leipzig*an universitaton. Dum 1663 li studis en Jena sed baldaŭ revenis al *Leipzig*. Publikiginte sciencan matematikan disertacion, li aspiris la doktoran diplomon. Sed pro lia junaĝo la universitato ne subtenis liajn penadojn. Tial malbonhumore li forlasis *Leipzig*' on, por atingi sian celon ĉe la *Nürnberg*' a universitato “*Altdorf*”. Lia tiea pordoktora diskutado vekis tian admiron ĉe la ekzamenintoj, ke oni tuj proponis – *al la dudekjara Leibniz* – profesoran katedron.

Sed por atingi ankoraŭ pli altan gradon, li ĉi tiun proponon rifuzis.

Baldaŭ li okupis sin en la publika vivo kaj volis interpacigi la kontraŭulojn en la tiutempaj religiaj bataloj, opiniante, ke la religio devas akceli la interhoman pacon, kaj ne esti misuzata por semi malpacon inter la diversreligianoj. En 1672 li veturis *Parizon*, por tie sin okupi pri diversaj studoj. Li estis akceptata de *Ludoviko XIV*, al kiu li submetis kolonian proponon. En *Parizo* li estis altirita

de la eminentaj scienculoj de filozofio, teologio, matematiko kaj aliaj sciencoj. Studante (p. 18) precipe la verkojn de la nederlanda matematikisto Huygens kaj influita de li, li sukcesis la 29an de Oktobro 1675 trovi la fundamentajn leĝojn de la *Infinitezima kalkulo*. Leibniz intencis konstante vivi en Parizo, sed post la tria invito de la Kurfürst (elektoprince) de Hannover li fariĝis en Hannover bibliotekisto kaj membro de la tiea konsilanta kolegio (1676).

Antaŭ sia enoficiĝo li vizitis *Anglujon* kaj *Nederlandon*. En Hago li kunvenis kun la nederlanda eminenta filozofo Spinoza.

Rapide kreskis la famo de *Leibniz*.

Okupante sin pri la ampleksa, mirinde multflanka verkaro de Leibniz, oni ne nur renkontas grandan filozofon kaj historiiston, kreantan matematikiston kaj naturscienciston, sed ankaŭ samtempe profundan lingviston, lertan stiliston kaj influriĉan ŝtatviron.

Unuvorte: universalan geniulon, la lastan *polihistoron*.

Leibniz, la ŝtatisto kaj diplomato.

De la tiamaj regnestroj li ofte estis petata ĉe la solvo de ŝtataj kaj diplomaciaj aferoj. Kun klera kaj ekzakta profundeco li solvis ĉiujn malfacilajn taskojn. Li vojaĝis multe kaj restadis ofte longan tempon en la gravaj eŭropaj rezidencurboj.

En Berlino li fondis la *Akademion de Sciencoj*, kies unua prezidanto li estis (1700).

En la jaroj 1687 ĝis 1690 li travojaĝis *Germanujon* (p. 19) kaj Italujon. En *Vieno* li laboris naŭ monatojn, interrilatante kun la plej influriĉaj personoj. En la tiama potenca aŭstria metropolo ekestis sub lia plumo gravaj ŝtataj dokumentoj.

En *Romo* oni proponis al Leibniz la plej honorplenajn oficojn kaj eĉ prezentis al li la direktoran postenon ĉe la vatikana biblioteko, kun kiu posteno ordinare estas kunigita la kardinalrango. Por resti sendependa li rifuzis ĉi tiun honorigan oficon.

En *Torgaŭ* li kunvenis (1711) kun la rusa caro, *Petro la Granda*, kies eksterordinarajn kapablojn Leibniz tuj ekvidis. Li faris al la rusa imperiestro multajn proponojn pri la kulturigo de la granda norda imperio. La caro aŭdis lin kun granda intereso kaj realigis kelkajn el tiuj proponoj. Laŭ la deziro de la caro ellaboris Leibniz vicon da memorandoj pri la plej diversaj rusaj aferoj. Pro la reformprojekto de la rusa juĝeja regularo Leibniz estis nomata rusa sekreta justeckonsilanto kaj ricevis konsiderindan pension.

En la jaro 1712 la germana imperiestro nobeligis Leibniz, kaj distingis la filozofon per la plej alta rango, kiun li povis doni, nome Reichshofrat (regna kortega konsilanto).

Leibniz, la scienculo.

Kvankam Leibniz pro siaj historiaj, ŝtataj laboroj estis tre okupita, li tamen trovis tempon pliriĉigi la diversajn scienco-branĉojn per unuarangaj verkoj. Precipe pri historio, religio, filozofio, naturscienco (p. 20), matematiko kaj geometrio li skribis gravajn verkojn, kiuj ankoraŭ hodiaŭ servas kiel modeloj kaj direktivoj en la koncernaj fakoj.

Menciinde estas ankaŭ, ke li konstruis la unuan kalkulmaŝinon.

Ĉion tion li nur povis plenumi, ĉar li estis vere universala scienculo.

Leibniz kiel mondlingvano.

Pro lia vera kosmopoliteco oni ne miras, renkonti lin laboranta sur la kampo de la Universala Lingvo.

Jam en lia juna aĝo ekestis ĉe li profunda inklino por mondlingvaj studoj kaj laboroj. Ĉi tiu neordinara spirito – kaj ne nur la unika scienculo kaj pensulo de sia tempo, sed ankaŭ unu el la maloftaj unuaklasaj steloj sur la scienca firmamento de ĉiuj epokoj – enprofundiĝis dum sia tuta vivo en la studon kaj esploron de la interhomara lingvo. Li ĉiam serĉis la sekretajn leĝojn kaj la praktikajn rimedojn por la Universala Lingvo.

Estante deknaŭjara li skribis sian “*Ars combinatorio* (la arto de kombino)” kiu enhavas la ĝermojn de la Universala Lingvo. Ĉi tie li penas solvi la problemon per kombinado, provante doni al sia artefarita lingvo bazon sur racia kalkulsistemo per ciferoj, literoj kaj matematikaj simboloj.

En sia *Historia et commendatio* li pledas por karakterizaj nombroj kiel signoj por la elementaj ideoj. “La komplikaj ideoj”, li diras, “estas kombinaĵoj (p. 21) el ideoj simplaj, same kiel la divideblaj nombroj rezultiĝas el la multobligo de la nedivideblaj nombroj (primfaktoroj).”

Ĉi tiu projekto estas simple

la kalkulo de ideoj,
la matematiko de ideoj,
la logika algebro,

kiu ricevis diversajn nomojn, kiel

Characteristica universalis,
Spécieuse générale,
Schriftensprache k.t.p.

Sed ne nur ĉi tiun pure racian, matematikan lingvon li prilaboris, sed li ankaŭ okupis sin pri alia, dua sistemo – mi dirus pri la praktika lingvo – sur la latina bazo. Pri tiuj laboroj kuŝas multaj centoj da manuskriptfolioj en la bibliotekarkivo de Hannover, kiuj bedaŭrinde ankoraŭ ne estas publikigitaj.

Ĉi tiu praktika internacia lingvo fundamentiĝas sur simpla, pure regula gramatiko. Ĉiuj detaloj de la gramatiko kaj derivado estas por ĝi ellaboritaj.

L. Couturat

Ĝis la komenco de la dudeka jarcento oni preskaŭ nenion sciis pri ĉi tiuj laboroj de *Leibniz*. Al la franca scienculo *Couturat* la mondlingvanoj ŝuldas grandan dankon pro lia traesplorado de la manuskriptoj en la Hannover' a arkivo. Dum 1901—1903 *Couturat* publikigis grandan serion da ili, kiuj ĝis tiam estis nekonataj kaj neeldonitaj. (p. 22) Tiu serio estas kolektita en du volumoj kun 1300 paĝoj.

Couturat diras, ke se oni volus ankoraŭ eldoni ĉiujn aliajn manuskriptojn, kiuj enhavas la primondlingvajn laborojn de *Leibniz*, oni certe plenigus per ili almenaŭ du volumojn kun pli ol 2000 paĝoj.

Legante la historion pri la Universala Lingvo, oni tial komprenas la eraropinion de kelkaj aŭtoroj, kiuj asertas, ke *Leibniz* sin okupis nur pri filozofia mondlingvo. La publikaĵoj de *Couturat* por ĉiam forigas ĉi tiun malĝustan opinion, kaŭzitan de nescio.

Se oni iam povos traesplori kaj eldoni la kompletajn verkojn de *Leibniz*, kiuj rilatas al la Universala Lingvo, tiam la sciencularo certe ŝanĝos sian sintenadon kaj kontraŭecon rilate la artefaritan lingvon kaj rilate Esperanton. En siaj tiuspecaj laboroj *Leibniz* nerefuteble montras, ke artefarita lingvo estas skribe kaj parole ebla kaj ne la fantazia kimerio en la kapo de la nepraktika revemulo.

Kelkaj eltiroj de *Leibniz* pri la Universala Lingvo

“...signoj, kiuj esprimas ĉiujn miajn ideojn, estigos novan lingvon, kiu povos esti skribata kaj elparolata: ĝia farado estos tre malfacila, sed oni ĝin facile lernos...ĝi mirinde servos por la interkomunikado inter pluraj popoloj.”

Aliloke *Leibniz* parolas pri tutmonda societo, “kiu kolektos ĉiujn sciojn de la homaro, ellaboros (p. 23) taŭgan lingvon... por disvastigi la lumon de klereco.”

Lia entuziasmo eĉ antaŭdiras,

“ke en tiu Universala Lingvo oni verkos poemojn, himnojn, kiuj povos esti kantataj.”

Unu manuskripton la mondcivitano *Leibniz* finas jene:

“Tiu ĉi lingvo estos la plej granda organo de la racio. Mi kuraĝas diri, ke tio ĉi estos la lasta peno de

la homa spirito, kaj kiam la projekto estos efektivigita, nur de la homoj dependos esti feliĉaj, ĉar ili havos ilon, kiu ne malpli servos entuziasmigi la racion ol la teleskopo servas por plifortigi la okulon...

Mi estas certa, ke neniu eltrovaĵo estas tiom grava kiel ĝi, kaj nenio kapablas tiom eternigi la nomon de la elpensinto. Sed pli fortajn motivojn mi havas pri tio pensi, ĉar la religio, kiun mi plenumas fidele, min certigas, ke la amo al Dio konsistas en arda deziro, havigi la komunan bonon, kaj la prudento diras al mi, ke nenio pli kontribuas al la komuna bono de ĉiuj homoj ol tio, kio ĝin perfektigas.”

(El la *Bibliografio de Int. L.*)

Aliloke: “Se unu lingvo ekzistus en la mondo, la homaro gajnus la trionon de sia vivo, kiun ĝi ja nun ofertas pro la (multaj) lingvoj.”

(p. 24) **John Locke, la angla filozofo (1632-1704), kaj Leibniz.**

John *Locke*, la samtempulo de *Leibniz*, publikigis en la jaro 1690 la verkon:

Essay on human understanding

(Esploroj pri la homa intelekto)

kiu trovis en la tuta mondo grandan aplaŭdon.

En la jaroj 1694, 1697 kaj 1700 aperis la dua ĝis la kvara eldonoj kaj en la jaro 1700 (en Amsterdamo) la franca traduko de Coste. (La dua eldono 1729, la tria 1742).

Ĉi tiu verko tiel forte influis *Leibniz*, ke li verkis la polemikan verkon:

Neue Abhandlungen über den menschlichen Verstand (Novaj traktaĵoj pri la homa intelekto), kiu sin distingas per genia mondpercepto kaj okupas ne nur eminentan, sed ankaŭ daŭran lokon en la filozofia literaturo.

Ĝi ampleksas kvar librojn kun pli ol 600 paĝoj.

La kaŭzo, kial mi atentigas la leganton pri tiu grandioza verko, estas ĝiaj klarigaj, interesaj informoj pri la lingvo ĝenerale kaj ĝiaj aksiomoj pri lingvoscienco kaj filozofio.

Leibniz, kiel mi jam diris, de post sia junaĝo prilaboris lingvajn demandojn, kion montras al ni ankaŭ lia verko: *De stilo philosophico Nizolii* kaj liaj multaj leteroj. (noto 1: Iobi Ludolfii et God. Guil. Leibnitii commercium epistolicum. Recensuit A. B. Michaelis. Göttingen. V. Bossigelus.)

(p. 25) La unuaj ĉapitroj de *Neue Abhandlungen ü. d. m. V.* montras la intereson de *Leibniz* por la antologio kaj klasifikado de la lingvoj kaj plue por la esenco de la lingvo.

Alia parto temas pri la diversaj lingvomankoj, pri ilia uzo kaj pri la rimedoj, eviti ilin. (noto 2: L. Neff. G.W. Leibniz also Sprachforscher und Etymologe I. II. Teil Heidelberg. A. H. Avenarius 187'-1871).

Georgo Dalgarno

En la dua ĉapitro (pĝ. 284) li aludas la verkon de *Georgo Dalgarno* (1627-1687): *Ars signorum vulgo character universalis et lingua philosophica* (Londono 1661). (La arto de la signoj aŭ la ĝenerala signaro kaj lingvo filozofia). La sistemo de la altinstruita kaj klera pedagogo *Dalgarno* estas bazita sur logika klasifiko de ideoj, dividitaj en 17 fundamentaj klasoj. Li diras, ke kun helpo de lia sistemo ĉiu homo, li apartenas al kiu ajn nacio, estas kapabla esprimi ĉiujn siajn pensojn kaj povas tuj interkompreniĝi.

Al tiu sistemo parte apogas sin *Leibniz* en sia filozofia lingvo. (noto 3: Monatsberichte der Königlich-Akademie der Wissenschaften zu Berlin. Jan. 1861, pĝ. 170—219.)

(p. 26) **John Wilkins.**

(noto 4: Wilkins ellaboris por ĉi tiu tempo vere spiritplenan sistemon de skriba kaj parola *filozofia*

lingvo:

“*An Essay towards a real character and a Philosophical Language with an alphabetical Dictionary*”, London, 1668.

En ĉi tiu sistemo la ideoj estas dividitaj en 40 ĉefklasoj, ĉi tiuj en subklasoj k.t. p. Li uzis specialajn signojn kaj sonkunmetaĵojn.)

Sur paĝo 248 (noto 5: paĝindikoj en “*Neue Abb. über d. m. V.*”) Leibniz mencias la filozofian lingvon de *John Wilkins* (1614-1672), episkopo de Chester, unu el la plej eminentaj scienculoj de Anglujo, fondinto de la Reĝa Societo en Londono kaj ĝia unua sekretario. Li estis pro sia lingvo-sistemo tre estimata de Leibniz.

Sur paĝo 291 (noto 6: paĝindikoj en “*Neue Abb. über d. m. V.*”) citas Leibniz de li ŝatatan lingviston Samuel Borchart (± 1667), kies verkoj en la jaro 1692 aperis en *Leiden* kaj *Utrecht* kaj en kiuj Borchart volas etimologie devenigi ĉiujn lingvojn el la hebrea kaj fenika lingvoj.

En la naŭa ĉapitro (p. 364) (noto 7: paĝindikoj en “*Neue Abb. über d. m. V.*”) kaj kelkloke en la kvara libro Leibniz aludas la planon pri tiel nomata Generala Karakteristiko aŭ Filozofia Lingvo (*spécieuse générale*). Kvankam *Leibniz* al ĉi tiu ideo dediĉis multjaran atenton, kaj spite de siaj diversspecaj antaŭlaboroj, li ne povis realigi sian intencon.

Kio ne rilatas al la lingva afero, sed plilumas la noblan karakteron de Leibniz, estas la difino de la amo, kiu difino similas al tiu de *J. Locke*.

Leibniz diras: “*Amo estas la ĝojo pri la feliĉo* (p. 27) *de la alia*”, aŭ, kio estas preskaŭ la samo: “*Fremdan feliĉon proprigi al si*”.

La verko, al kiu mi dediĉis pli multe da spaco, ĉar ĝi en la mondlingva literaturo ankoraŭ ĝis nun ne estis pritraktata, estis ellaborita en la jaro 1703 kaj aperis nur post 61 jaroj (1765). (noto 8: R.E. Raspe: *Oeuvres philosophiques latines et françaises de feu Mr. de Leibniz*. Amsterdam et Leipzig.) Antaŭ ol mi finas la ĉapitron pri *Leibniz*, mi ne povas preterlasi kun profunda dolorsento ion diri pri la tragiko en la lasta vivtempo de ĉi tiu granda spirito, kies helpon kaj servon ĉiuj tiamaj potenculoj kaj kleruloj ofte elpetis.

Ĉe lia biografo I. H. v. *Kirchmann* oni legas pri la tragedia fino de *Leibniz*:

“De sia popolo malmulte taksata laŭ sia valoro kaj malbone pritraktata de la kortego, al kiu li servis plej fidele kaj plej sukcesplene, tiel *Leibniz* travivis en Hannover siajn lastajn jarojn en laborplena soleco. Li estis malmulte ŝatata tie, kie li tion nepre ne meritis, ja eĉ traktata per maldanko...”

Ĝis sia vivofino li estis okupita pri historiaj kaj filozofiaj studoj, pri sia grandega interkorespondado, kiu – ĉiufanken mirige disvastiĝinta – ampleksis ne nur Germanujon sed la tutan civilizitan mondon.

La 14an de Novembro 1716 mortis je doloriga malsano sen atestantoj la sepdekjara grandegulo.

Lia fidela sekretario *Eckhard* estis la sola, kiu la mortecajn restaĵojn de la filozofo akompanis al la lasta ripozejo.

(p. 28) Skota nobelo alveninta je la mortotago de *Leibniz* al Hannover, diras, ke *Leibniz* estis enterigita kvazaŭ bandito kaj ne kiel homo, kiu estis la gloro de sia patrujo. Ankaŭ la Akademio en Berlino tute silentis ĉe la morto de sia fondinto kaj prezidanto. Nur la eksterlando je hontigo por Germanujo honoris lian memoron per belega solena parolado, kiun post unu jaro *Fontenelle* faris en la *Pariza Akademio*.

Friedrich Nietzsche (1844—1900).

Kiel moderna filozofo kaj poeto-verkisto *Nietzsche* forte influas la nunan epokon. Multaj liaj ideoj estas transprenitaj en la publika vivo. *Nietzsche* distingas sin per klara, brila stilo kaj estas post Goethe la plej bona kaj perfekta reganto de la germana lingvo.

En sia verko: *Menschliches, Allzumenschliches, ein Buch für freie Geister* (noto 9: *Homeca, Trohomeca, libro por liberaj spiritoj*.) (1876) li antaŭdiras en § 267 tiamaniere la internacian lingvon:

“La lernado de pluraj lingvoj plenigas la memorkapablon per vortoj anstataŭ per faktoj kaj pensoj; sed la memoro estas ujo, kiu ĉe ĉiu homo povas ampleksi nur definitive limigitan enhavokvanton. Plue la lernado de pluraj lingvoj malutilas, ĉar ĝi estigas la konvinkon, ke oni posedas kapablojn, kaj fakte ĝi eĉ ne kontribuas la deloga reputacio (p. 29) en interrilatoj; ankaŭ nerekte ĝi malutilas, nome en la senco, ke ĝi kontraŭagas la akiron de la fundamentaj scioj kaj intencon honeste meriti estimon de la homoj. Fine ĝi estas la hakilo, metata ĉe la radikoj de la subtila sento ene de la gepatra lingvo: ĝi neripareble difektas tiun ĉi senton kaj neniigas ĝin. La grekoj kaj la francoj, ambaŭ popoloj, kiuj havas la plej perfektajn stilistojn, ne lernis fremdajn lingvojn. Sed ĉar la interrilatoj de la homoj devas daŭre fariĝi pli kosmopolitaj kaj, ekz., jam nun bona komercisto en Londono bezonas komprenigi sin en ok lingvoj skribe kaj buŝe, tial la lernado de pluraj lingvoj fariĝas necesa malbono; tiu ĉi malbono, atinginte sian ekstreman formon, devigos la homojn trovi kuracilon: kaj iam en malproksima estonteco ekzistos ajna nova lingvo, komence kiel lingvo por la komerco, poste kiel lingvo de spiritaj interrilatoj por ĉiuj ĝenerale; tio ĉi estas same certa, kiel certe estas, ke iam ekzistos la aerŝipveturado. Kiacele ja la lingvistiko dum tuta jarcento estus studinta la leĝojn de la lingvoj kaj analizinta tion, kio estas necesa, valora kaj originala en ĉiu unuopa lingvo!”
Jen la teksto de la germana originalo:

267 “Viele Sprachen lernen füllt das Gedächtnis mit Wörtern statt mit Tatsachen und Gedanken, während dies ein Behältnis ist, welches bei jedem Menschen nur eine bestimmt begrenzte Masse von Inhalt aufnehmen kann. Sodann schadet des Lernen vieler Sprachen, insofern es den Glauben, Fertigkeiten zu haben, erweckt, und tatsächlich auch ein gewisses verführerisches Ansehen im (p. 30) Verkehr verleiht; es schadet sodann auch indirekt, dadurch, dass es dem Erwerben gründlicher Kenntnisse und der Absicht, auf redliche Weise die Achtung der Menschen zu verdienen, entgegenwirkt. Endlich ist es die Axt, welche dem feineren Sprachgefühl innerhalb der Muttersprache an die Wurzel gelegt wird; dies wird dadurch unheilbar beschädigt und zu Grunde gerichtet. Die beiden Völker, welche die grössten Stilisten erzeugten, Griechen und Franzosen, lernten keine fremden Sprachen. Weil aber der Verkehr der Menschen immer kosmopolitisch werden muss und zum Beispiel ein rechter Kaufmann in London jetzt schon sich in acht Sprachen schriftlich und mündlich verständlich zu machen hat, so ist freilich das Viele-Sprachen-lernen ein notwendiges Uebel; welches aber, zuletzt zum Aeussersten kommend, die Menschheit zwingen wird, ein Heilmittel zu finden: und in irgend einer fernen Zukunft wird es eine neue Sprache, zuerst als Handelssprache, dann als Sprache des geistigen Verkehrs überhaupt für Alle geben, so gewiss also es einmal Luft-Schiffahrt gibt. Wozu hätte auch die Sprachwissenschaft ein Jahrhundert lang die Gesetze der Sprachen studiert und das Notwendige, Wertvolle, Gelungene an jeder einzelnen Sprache abgeschätzt!”

Jam antaŭ sesdek jaroj *Nietzsche* profete antaŭvidis la aerveturadon, pri kiu la tiamaj fakuloj havis la malan opinion, kaj – kiel ni mem tion travivis – ili mokis pri la unuaj pioniroj de la aerflugo. Samegale *Nietzsche* estis konvinkita pri la estonta mondlingvo, kiam la lingvistoj ankoraŭ nur moke aŭ komplate ridetis pri ĝi kiel pri utopio de nekompetentaj fantaziuloj.

Sed hodiaŭ la flugmaŝinoj trasflugas la ŝtatojn, kaj en nemultaj horoj ebligas la komunikadon inter (p. 31) la kontinentoj. Hodiaŭ jam anoj de proksimume sepdek nacioj skribe kaj parole interkompreniĝas per la simpla, facile ellernebla, elpensita lingvo *Esperanto*.

Jes, spite al la skeptikuloj la senflugila homaro flugas, flugas pli rapide ol ĉiuj flugilhavantaj estaĵoj. Jes, spite al la skeptikuloj la multcentlingva homaro posedas taŭgan, facilan helplingvon, kiun dekmiloj da diversnaciaj adeptoj hodiaŭ jam parole kaj skribe uzas por la plej diversaj celoj.

Pri kio la grandaj filozofoj kaj scienculoj laboris kaj revis, kion ili ne povis solvi kaj trovi, tion la modesta saĝulo de Bialystok donacis al la homaro en sia lingvo “Esperanto”.

(p. 32) **Listo de uzitaj verkoj kaj fontindikoj:**

L. Couturat et L. Leau: Histoire de la langue universelle. Hachette et Cie. Paris. (1903, 1907).
Edmond Privat: Historio de la lingvo Esperanto. Leipzig. P. Stojan: Bibliografio de internacia lingvo. Genève. 1929.
E. Drezen: Historio de la mondlingvo. Leipzig 1931.
I. Dolezal: Jan Amos Komensky, Červený Kostelec. 1921.
Sammlung der Hauptwerke der Philosophie alter und neuer Zeit. Hefte 215—217. Leipzig 1875.
Philosophische Reihe. Gebrüder Paetel Verlag. Berlin-Leipzig.
W. Windelband: Die Geschichte der neueren Philosophie. Leipzig 1911. Verlag Breitkopf & Härtel.
Un. Prof. Dr. Frans Drtina: Jan Amos Comenius, Zijn tijd, zijn leven en zijn werk. (Ter vereenigde Drukkerijen, Amsterdam).

Kelkaj verkoj de kaj pri Leibniz:

Leibniz – Analysis linguarum.
Leibniz – De grammatica rationali, 1716.
Leibniz – Grammatica cogitationis.
Leibniz – Lingua rationalis.
Leibniz – Lingua universalis.
Leibniz – Linguae philosophicae specimen.
Leibniz – Geschichte und Empfehlung einer allgemeinen Schriftzeichensprache. (“Leibniz Werke nach Raspe”. Voll. II. pĝ. 645—653).
Allgemeine deutsche Biographie. 18. Band 1883. Leipzig (Dunker & Humblot).
Couturat – La logique de Leibniz, d'après des documents inédits. 1901. Paris. (Paul Brodard).
Couturat – Leibniz: Opuscules et fragments inédits de Leibniz. 1930. F. Alcan. Paris.
E. Zeller – Geschichte der deutschen Philosophie seit Leibniz. München, R. Oldenburg 1873.
Über Leibnizens Entwurf einer allgemeinen Charakteristik. (Historische Beiträge zur Philosophie. Bd III. Bethge, Berlin 1867).